La diversaj priskriboj de Antinoelo antarktika iom varias, precipe rilate al la ekzisto de fruntaj kornoj, la okuloj, la koloro de la antenobazoj, la papiloj de la ventraj ĉiroj kaj la pintoj de la ventraj ĥetoj. Ĉar la ekzemplero troviĝas interne de la limoj de tiuj varioj, mi kalkulas ĝin al la specio Antinoelo antarktika. — Augener (1928: 688) montras ke la genra nomo Antinoo (*Antinoe*) ne estas akceptebla kiel valida, kaj proponas la nomon Antinoelo (*Antinoella*), kiun akceptis Hartman (1964).

Lopadorinĥo mallonga — *Lopadorhynchus brevis* Grube, 1855

Sinonimaro: Støp-Bowitz, 1948.

Unu sola ekzemplero, 6 mm longa, devenanta de „Snellius", St. 16a, 22°28,5′ N 37°29,0′ Or., en la Ruĝa Maro, kaptita per staminreto kun 300 m da kablo, la 15an de Aprilo 1929. La ekzemplero estas iom difektita pro sekiĝo, sed tiom, kiom oni povas vidi, ĝi plene akordiĝas kun la priskribo farita de Wesenberg-Lund (1939: 12).

Pelagobio longĉira — *Pelagobia longicirrata* Greeff, 1879

Sinonimaro: Støp-Bowitz, 1949.

Ĉi tiu estas unu el la 4 specioj plej abunde reprezentataj en la materialo: troviĝas 80 ekzempleroj, ĝenerale bone konservitaj, devenantaj el la regiono inter la Buvet-Insulo kaj la Ŭedel-Maro. Ĉiuj estas kaptitaj per plankton-reto, la plej profunda tiro okazis de 500 ĝis 250 m, la plej malprofunda de nur 5 ĝis 0 m.

La specio vivas en la maro ĉirkaŭ la tuta Antarktika kontinento. Cetere, estante evidente tre eŭriterma, ĝi troviĝas en la tuta Atlantiko ĝis Groenlando, en la Mediteraneo kaj en la Hinda Oceano.

Gen. Vanadiso — *Vanadis* Claparède, 1870

Claparède (1870: 480) informas ke la nomo *Vanadis* estas unu el la nomoj de Freia, la Venuso skandinavia. Ĉar tiu nomo estas kunmetaĵo (Vana-dis, t. e. diso el la gento Vana, diso estis speco de diino), la etimologie ĝusta formo devas esti Vanadiso, ne Vanado.

Vanadiso antarktika — *Vanadis antarctica* (McIntosh, 1885) Apstein, 1900

Sinonimaro: Støp-Bowitz, 1949.

La materialo konsistas el 18 antaŭaj korpopartoj kun kapoj, ĉiuj akompanataj de diversaj korpaj fragmentoj, kaj unu sola korpfragmento, sekve minimume 19 ekzempleroj. Ili estas kaptitaj per stamin-reto de 150 cm aŭ per plankton-reto de 60 cm en profundoj de 75-0 m, 75-50 m, 100-0 m, 100-50 m inter la Buvet-Insulo kaj la Ŭedel-Maro.

La specio estas evidente tre fragila, ĉar la ekzempleroj ĉiam estas rompiĝinta en plurajn pecojn. Ili plene konformas kun mia priskribo (1949: 5, kun la korekto de 1951: 7). De la 18 kaphavaj ekzempleroj 7 estas ♂♂, 8 ♀♀ kaj ĉe la ceteraj 3 la dorsaj ĉiroj de la du unuaj malgrandaj, sed kompletaj piedetoj estas iom pli grandaj kaj dikaj ol ĉe ordinaraj ♂♂, tiel ke mi konsideras ilin ♀♀, kies sperm-receptakloj estas malplenaj. — La distribuo de la pigmentregionoj varias ne malmulte. Ĝi povas esti tre regula, ekz. la tentakloĉiraj segmentoj kaj la unuaj 3 piedetaj segmentoj senpigmentaj, sekvas 5 pigmentaj, 4 senpigmentaj, kaj poste po 2 pigmentaj kaj senpigmentaj. Ĉe aliaj ekzempleroj la pigmento komenciĝas de la kapeto; okazas ankaŭ ke la pigmento estas malegale distribuita sur la dekstra kaj la maldekstra flanko. Glandoj ekzistas sur ĉiuj segmentoj, sed sur la senpigmentaj segmentoj ankaŭ la glandoj estas senpigmentaj.

La specio vivas ĉirkaŭ la tuta Antarktika kontinento.

Vanadiso longega — *Vanadis longissima* (Levinsen, 1885) Apstein, 1900

Rhynchonerella longissima Levinsen, 1885: 330.
Vanadis fasciata Apstein, 1890: 541; 1891: 130.
Vanadis longissima, Apstein, 1900: 11; Fauvel, 1923: 207; Monro, 1930: 79; Støp-Bowitz, 1948: 29.

Unu sola ekzemplero, malgranda, maldika, konsistanta el kapeto kaj proks. 30 segmentoj, kaj du malgrandaj korpaj fragmentoj, ne tre bone konservitaj. Loko: 66°58′ S., 16°03,5′ Ok.; plankton-reto de 60 cm; 100-0 m.

La korpo estas proks. 1 mm. larĝa, kun la piedetoj proks. 2 mm. La ekzemplero konformas bone kun la priskriboj de Apstein, Fauvel kaj Monro. Kiel ĉe aliaj Vanadisoj troviĝas 3 paroj da tentaklociroj; tiuj de la t. n. kvara paro estas plataj, foliformaj, situantaj pli alte kaj montrantaj bazon de koresponda ventra folio, tiel ke ili sendube reprezentas la kutiman paron de rudimentaj piedetoj. Post ili sekvas 6 aŭ 7 paroj da malgrandaj, sed kompletaj piedetoj, kaj fine la piedetoj grade atingas la normalan grandecon. La glandoj troviĝas nur sur po 1-2 segmentoj sekvataj de kelkaj segmentoj senglandaj. Kiam Apstein (1900: 11) skribas ke la glandoj estas tre grandaj, kaj ke ili tre vaste disbranĉiĝas sur la segmentoj, li misinterpretas la tutan pigmentitan areon kiel glandon. Efektive la glandoj mem estas malgrandaj, sed la pigmento de ili disbranĉiĝas pli-malpli vaste sur la ĉirkaŭajn partojn de la korpo. — Cetere, sur la antaŭa flanko de ĉiu el la okuloj troviĝas pigment-makulo.

La specio evidente estas tre eŭriterma kosmopolito; ĝi estas trovita en la orienta parto de la Sargaso-Maro (Levinsen, 1885), en la Sud-Ekvatora Kurento (Levinsen, 1885, Apstein, 1900, Monro 1930), Norda Pacifiko (Apstein, 1890), Hinda Oceano (Apstein, 1891), Drake-Markolo, Antarktiko (Monro, 1930).

* * *

Tebble (1960: 224) aludas ke Vanadiso antarktika (*Vanadis antarctica*) kaj V. longega (*V. longissima*) (Tebble, 1960: 189 aldonas ankaŭ: V. violeca (*V. violacea*)) eble reprezentas geografiajn rasojn de unu sama specio. La aktuala trovo de V. longega en la Antarktika reginio montras ke ili povas ekzisti kune. Mi ankaŭ trovas malfacile imagi ke la granda, fortika V. antarktika kaj la tenera, gracila V. longega reprezentas la saman specion. Simile mi trovas malfacile akceptebla la ideon ke V. violeca, kiu ne montras la karakterizan alternadon de pigmentaj kaj senpigmentaj regionoj, apartenu al unu el la menciitaj specioj.

Alciopumo parazita — *Alciopina parassitica* Claparède & Panceri, 1867

Sinonimaro: Støp-Bowitz, 1948.

Du fragmentoj konsistantaj el kapeto kaj 16, resp. 17 ĥetoportaj segmentoj, kaj du postaj korpofragmentoj malpli bone konservitaj, sed kiuj ŝajnas aparteni al la sama specio. Unu devenas de ekster la bordo de Senegalo, la alia de sude de la Ebura Bordo.

La ekzempleroj bone harmonias kun la priskribo kaj figuroj de Wesenberg-Lund (1939: 36). Mi volas nur rimarkigi ke la helaj ventraj makuloj estas tre malforte markitaj. La unuaj 5 paroj da ventraj glandoj estas grandaj, piroformaj, la sekvantaj malgrandaj, sed klare videblaj, kredeble malplenaj, kaj portas tubosimilan ekstremaĵon. Ĉe ambaŭ ekzempleroj la faringo estas eligita; ĉe unu ĝia rando estas provizita per rondaj papiloj, ĉe la alia la rando estas preskaŭ ebena.

Kronio skvama — *Krohnia lepidota* (Krohn, 1845) de Quatrefages, 1865

Sinonimaro: Støp-Bowitz, 1948.

Tri malgrandaj korpofragmentoj sen kapeto kaj en tre malbona stato, sen ĉiroj, devenantaj de sude de la Ebura Bordo.

La du dorsaj kaj tri ventraj vicoj da pigmentmakuloj, bone respondantaj al la priskriboj de Wesenberg-Lund (1939: 38) kaj Støp-Bowitz (1948: 33) sufiĉas por la identigo.

Rinĥonerelo Peters'a — *Rhynchonereella petersii* (Langerhans, 1880) Støp-Bowitz, 1948

Sinonimaro: Støp-Bowitz, 1948.

Nur fragmento, malantaŭa korpoparto, sen kapeto, devenanta el la regiono de la Sud-Ekvatora Kurento.

La piedetoj portas etan ĉiroforman apendicon; la dorsaj harformaj ĥetoj estas kunmetitaj; la nepinta, kvazaŭ hakita formo de la ventraj aciklaj ĥetoj montras ke la ekstrema parto perdiĝis. El la ĉiroj restas nur kelkaj el la ventraj, kiuj estas ovalaj kaj malpli longaj ol la piedetoj. La glandoj estas senpigmentaj, la pigmento kredeble malaperis en la alkoholo.

Rinĥonerelo Bongrain'a — *Rhynchonereella bongraini* (Gravier, 1911), Tebble, 1960

Sinonimaro: Tebble, 1960.

La specio estas la plej abunde reprezentata en la materialo: 781 ekzempleroj kun kapeto kaj amaso da korpofragmentoj. Ili ĝenerale ne estas tre bone konservitaj, precipe la ĥetoj ofte estas rompitaj. La tuta materialo estas kaptita per plankton-reto en la regiono ĉirkaŭ la Buvet-Insulo. La plej profunda tiro okazis de 500 ĝis 250 m, la malplej profunda de 50 ĝis 0 m; la specio estas plej multnombra en la tiroj inter 200 kaj 100 m kaj inter 500 kaj 250 m, kio bone harmonias kun la indiko de Tebble (1960: 218) ke la specio apartenas al la supraj 500 m, t. e. la Antarktika surfaca akvo kaj la supraj tavoloj de la varma profunda akvo. Ĝi estas endema antarktika specio konata de la lokoj ĉirkaŭ la tuta orienta parto de la kontinento, de la Ŭedel-Maro ĝis la Ross-Maro.

Ĉe kelkaj ekzempleroj la ventra tentakloĉiro de la 3a segmento estas klare videbla, ĝi estas iomete pli granda ol sur mia figuro (1949: 13), kaj foliforma.

En la literaturo la aktuala specio estas kalkulata jen al la genro Kronio (*Krohnia, Callizonella*), jen al Rinĥonerelo (*Rhynchonereella, Callizona*). Tebble (1960: 191-192) diras: „No one has ever reported specimens of the species originally described as *Callizona bongraini* without compound chaetae on the anterior feet. Støp-Bowitz (1948, 1949 and 1951), however, placed it in *Krohnia* Quatrefages, 1965, which genus has only simple chaetae. Clearly the species must be included in *Rhynchonerella*, which it approaches in having compound chaetae, . . .". Fauvel (1923: 201) (kaj Monro (1936: 115)) dividas la Alciopedojn en du grupojn laŭ tio, ĉu ili havas unu aŭ du specojn de ĥetoj, harformaj kaj aciklaj; al la dua grupo, kun du specoj, apartenas la genroj *Alciopina* (*Corynocephalus*), *Plotohelmis* (*Rhynchonerella*), *Krohnia* (*Callizonella*), *Rhynchonereella* (*Callizona*). La diferenco inter la du laste nomitaj genroj estas ke ĉe *Krohnia* la harformaj ĥetoj estas simplaj, ĉe *Rhynchonereella* kunmetitaj, dum la aciklaj ĥetoj povas esti simplaj aŭ kunmetitaj ĉe diversaj specioj de la sama genro.

Mi lokigis la aktualan specion en la genron Kronio (*Krohnia*) ĉar ĝiaj harformaj ĥetoj ŝajnis al mi esti simplaj; sed tiu konstato estis necerta, ĉar la ĥetoj de mia pli frua materialo, same kiel de la aktuala, ne estas tre bone konservitaj, ili estas grandparte kurbigitaj aŭ rompitaj. Tebble (1960), kiu ne faras klaran distingon inter harformaj kaj aciklaj ĥetoj, evidente havis pli bone konservitan materialon, kaj kiel montras lia tekst-figuro 12 (Tebble, 1960: 191), ŝajnas ke ambaŭ specoj de ĥetoj, do ankaŭ la harformaj, efektive estas kunmetitaj; kaj, eĉ pli grave, en sia originala diagnozo de la specio (*Callizona bongraini*) Gravier (1911: 312) diras: „soies composées de deux types". Tial mi nun estas konvinkita ke la ĝusta loko de la specio estas en la genro Rinĥonerelo (*Rhynchonereella*).

Alciopedoj nedetermineblaj

En 3 specimenoj troviĝas nur nedetermineblaj fragmentoj de Alciopedoj. Du

el tiuj specimenoj devenas de la regiono kie Rinĥonerelo Bongrain'a troviĝas abunde, kaj temas kredeble pri fragmentoj de tiu specio. La tria devenas de la ,,Snellius"-stacio en la Ruĝa Maro.

Gen. Tomoptero — *Tomopteris* Eschscholtz, 1825

Tebble (1960: 171) substrekas ke estas neeble trovi klare limigan karakteron por distingi la du proponitajn subgenrojn de Tomoptero, Ĵonstonelo (*Johnstonella* Gosse, 1853) kaj Tomoptero (*Tomopteris* sensu stricto). Akceptante lian argumentadon, en ĉi tiu verko sekve mi ne praktikas la subdividon en subgenrojn.

Tomoptero Marian'a — *Tomopteris mariana* Greeff, 1882

Tomopteris Mariana Greeff, 1882: 387; 1885: 440; Apstein, 1900: 40.

Unu sola ekzemplero kompleta, devenanta el la Sud-Ekvatora Kurento, kaptita per plankton-reto de 46 cm, profundo: 75-50 m.

La ekzemplero estas 4 mm longa, kun 12 paroj da piedetoj. La du kapantenoj (fig. 2 a) estas meze longaj, la antaŭa rando formas kontinuan arkoforman linion kun eta pinto ĉe la mezo. La unua paro de ĥetapendicoj estas de la sama longeco, kiel la antenoj, la dua paro proks. same longaj, kiel la korpo. Du malhelaj okuloj situantaj tre proksime unu al la alia. Sur la trunko de ĉiu piedeto de la unua kaj dua paroj (fig. 2 b), ventre-antaŭe, troviĝas granda rozeto; ŝajnas ke ĝi situas interne de la piedeto kaj havas kanaleton kondukantan eksteren ventre-antaŭe. La naĝmembranoj de la piedetoj (fig. 2 c) estas rondformaj, kaj komence de la tria paro de piedetoj la ventra naĝmembrano portas malgrandan, ne klare distingiĝantan ĥromofilan glandon sub la pinto kaj malgrandan rozeton tuj super la pinto de la piedeta branĉo; la dorsa naĝmembrano portas malgrandan rozeton tuj sub la pinto de la piedeta branĉo. En la dorsa membrano de la piedetoj de la 3a ĝis 10a paroj, ekster la pinto de la piedeta branĉo, troviĝas ĉelaro, kiu eble respondas al hialina glando. Gonadojn en la piedetoj mi ne trovas, sed la korpo kaj la piedetaj trunkoj kaj branĉoj entenas grandajn ovojn. La piedetoj de la du lastaj segmentoj estas malhelaj, dikaj, kun pli longa dorsa kaj malpli longa ventra branĉo. Greeff (1885) imagas ke ĉi tiuj aliformitaj postaj piedetoj entenas spermon. — Entute la ekzemplero bone harmonias kun la priskribo kaj la figuroj de Tomoptero Marian'a ĉe Greeff (1885) kaj ĉe Apstein (1900), kiu retrovis la specion plurloke en la centra Atlantiko.

* * *

La originaldiagnozo de Eschscholtz (1825, kol. 736) tekstas jene: ,,*Tomopteris*, neu. Respirationsflossen an jeder Seite des Leibes zehn. Kopf mit Stacheln; am hintern Körperende noch vier Fortsätze, welche wahrscheinlich die Hauptorgane enthalten. Der Darmcanal läuft gerade durch die Körperhöhle. Am Rüssel zwey Fühler. Augen klein. In den Flossen kleine Kügelchen, die auch zuweilen in die Höhle des Mittelleibes gelangen. Fig. 5. T. onisciformis, Südsee, 2 ½ Linie lang". Ordinare oni konsideras ĉi tiun specion, la tip-specion de Tomoptero, nerekonebla; sed vidinte nun ekzempleron de T. Marian'a, mi frapiĝis de la simileco inter ambaŭ: 10 paroj da ordinaraj piedetoj plus 2 paroj da modifitaj malantaŭaj piedetoj, kiuj sur la primitiva desegnaĵo de Eschscholtz (fig. 2 d) aperas nigraj; la ,,malgrandaj globetoj", kiujn li observis en la piedetoj kaj en la korpo, kaj kiuj evidente estas la ovoj; la indikita longeco de ,,2 ½ linioj", kio respondas al proks. 5,5 mm. La indiko de loko, ,,Suda Maro", ordinare estas interpretata kiel ,,Suda Pacifiko", sed ĉar temas pri vojaĝo de la Finna Golfo ĝis Kamĉatko, verŝajne nenio malhelpas, ke la indiko celas la sudan Atlantikon. Aliflanke Dales (1959) anoncis T. Marian'an ankaŭ de la Malaka markolo kaj de la Sudĥina Maro. Mi tamen trovas konsilinde

atendi pluan konfirmon antaŭ ol ŝanĝi la nomon de T. Marian'a (*T. Mariana*) al T. oniskoforma (*T. onisciformis* Eschscholtz).

Tomoptero norda — *Tomopteris septentrionalis* de Quatrefages, 1865

Sinonimaro: Tebble, 1960.

Unu el la specioj abunde reprezentataj en la materialo: 394 ekzempleroj, kaj krome kredeble la plejparto de la neidentigeblaj Tomopteredoj apartenas al ĉi tiu specio. — La materialo estas kaptita parte per stamin-reto de 150 cm en la supraj 75 m, parte per plankton-reto de 46 cm inter 700 kaj 75 m, kaj parte per plankton-reto de 60 cm inter 100 kaj 0 m; 8 ekzempleroj trovitaj en specimeno prenita per plankton-reto de 60 cm tirita de 900 ĝis 0 m, povas esti kaptitaj pli profunde, sed ankaŭ povas esti enirintaj la reton en la supraj akvotavoloj. La tuta materialo devenas de la regiono inter la Buvet-Insulo kaj la Ŭedel-Maro.

La grandeco varias, kelkaj ekzempleroj estas tre malgrandaj, sed klare identigeblaj; unu el la plej malgrandaj, sed bone konservitaj ekzempleroj estas nur 3,5 mm longa, kun 14 paroj da piedetoj.

Tomoptero norda estas kosmopolita specio trovita pli frue ankaŭ ĉirkaŭ la tuta Antarktika kontinento. Ĝi ŝajnas aparteni al la Antarktika surfaca akvo kaj la supraj tavoloj de la varma profunda akvo.

Tomoptero planktona — *Tomopteris planktonis* Apstein, 1900

Sinonimaro: Tebble, 1960.

La materialo konsistas el 22 ekzempleroj pli-malpli bone konservitaj. Ĉiuj estas kaptitaj per plankton-reto, parte de 60 cm, parte de 46 cm, kaj troviĝas en specimenoj el plej diversaj profundoj: 75-50 m, 100-0 m, 150-75 m, 500-250 m, 900-0 m. Same kiel T. norda, ankaŭ T. planktona ŝajnas do aparteni al la Antarktika surfaca akvo kaj la supraj tavoloj de la varma profunda akvo. La tuta materialo originas de la regiono inter la Buvet-Insulo kaj la Ŭedel-Maro. — Iomete mirigas ke la materialo ne estas pli abunda, kio eble ŝuldiĝas al la kaptiloj uzitaj.

Ankaŭ T. planktona estas kosmopolita specio, trovita pli frue ĉirkaŭ la tuta Antarktika kontinento, escepte nur de la okcidenta sektoro.

Tomoptero Carpenter'a — *Tomopteris carpenteri* de Quatrefages, 1865

Sinonimaro: Tebble, 1960.

Ĉi tiu endema antarktika specio estas la plej granda el ĉiuj Tomopteredoj, povanta atingi la longecon de 90 mm. La materiale ampleksas 261 ekzemplerojn, ĉiuj estas trovitaj en la regiono inter la Buvet-Insulo kaj la Ŭedel-Maro. Nur unu sola el la Tomopteredoj nedetermineblaj ŝajnas esti T. Carpenter'a. La tuta materialo estas kaptita per stamin-reto de 150 cm, per plankton-reto de 30, 46 aŭ 60 cm kaj per ring-traŭlo de 150 cm, sed multekzemplere kaptis la specion nur la stamin-reto (40 ekzempleroj). Alia frapa fakto estas ke la tuta materialo estas kaptita inter 0 kaj 150 m de profundeco, kaj senkompare la plej granda parto inter 0 kaj 75 m, 40 ekzempleroj eĉ en specimeno el 0-4 m (plankton-reto de 60 cm).

La materialo ampleksas ekzemplerojn de ĉiaj grandecoj, inter 6 kaj 77 mm longaj. La malplej granda mezuras 6 mm de longo, kun 19 paroj da piedetoj, alia mezuras 9 mm kun 17 paroj da piedetoj. Ekzemplero 23 mm longa havas 29 parojn da piedetoj. Ili ĉiuj estas klare determineblaj, evidente temas pri junaj ekzempleroj. La plej malgrandaj estas kaptitaj en Februaro.

Tebble (1960: 227) trovis junajn ekzemplerojn de T. Carpenter'a en Januaro-Marto, kaj nur ĉirkaŭ Sud-Georgio, kaj li konkludas ke la specio reproduktiĝas tie, sed ne en la vasta maro. La aktuala materialo ŝajnas montri ke ĝi povas

reproduktiĝi ankaŭ malpli proksime al Sud-Georgio. — La indiko de Tebble (1960: 228) ke la „Norvegia" kaptis la specion ĉe la Sud-Sandviĉaj Insuloj, estas evidente skriberaro por la Sud-Orkadoj, sed la punkto, kiu devis indiki tiun trovon, bedaŭrinde elfalis sur mia mapo (1949: 15).

Mirigas ke neniu alia aŭtoro menciis la alternadon de pigmentaj kaj senpigmentaj regionoj de la korpo de T. Carpenter'a, kiujn mi priskribis (1949: 16), kaj kiujn mi pli-malpli klare observas ankaŭ sur multaj ekzempleroj de la aktuala materialo.

Tomopteredoj nedetermineblaj

En 6 specimenoj troviĝas Tomopteredoj, kies piedetaj membranoj estas tiom detruitaj, ke la glandoj ne estas troveblaj. Kredeble tamen temas grandparte pri ekzempleroj de T. norda, en unu okazo pri T. Carpenter'a. Plie troviĝas unu tre malgranda ekzemplero de nur 5 aŭ 6 paroj da piedetoj, kiu ŝajne ankoraŭ ne evoluigis glandojn, kaj kiu tial estas konsiderata kiel nedeterminebla juna ekzemplero.

Tifloskoleco Müller'a — *Typhloscolex muelleri* Busch, 1851

Sinonimaro: Tebble, 1960.

La materialo ampleksas 8 ekzemplerojn relative bone konservitajn, devenantajn de la regiono inter la Buvet-Insulo kaj la Ŭedel-Maro. Ĉiuj estas kaptitaj per plankton-reto en profundecoj de 100-0 m, 150-100 m kaj 500-250 m.

La nombro de segmentoj varias inter proks. 23 kaj 40. Ĉe pluraj ekzempleroj la faringo elstaras el la buŝo kaj havas la formon de iom kurba konuso, simile al tiu de Travisiopso Levinsen'a (*Travisiopsis levinseni*) (Støp-Bowitz, 1948: 60, fig. 47 a.).

La ekzempleroj varias de 2,5 mm ĝis 7,5 mm de longeco. Friedrich (1950: 311-315) priskribas diversajn formojn, i. a. du novajn speciojn, montrante la variadon de ĉi tiu genro. Tebble (1960: 196) supozas ke T. folia (*T. phyllodes* Reibisch, 1895) kaj T. Leuckart'a (*T. leuckarti* Reibisch, 1895) estas identaj kun T. Müller'a. Se tiu supozo estas prava, T. folia devas esti konsiderata kiel la plenkreska formo de T. Müller'a.

Ĉi tie mi devas atentigi ke la figuroj de Hartman (1964, pl. 20 fig. 6, 7, 8) ne montras T. Müller'an, sed Sagitelon Kowalevski'an (*Sagitella kowalevskii*).

T. Müller'a estas kosmopolita specio, kiu en la Antarktiko dum la vintro serĉas la pli profundajn, pli varmajn akvomasojn (Tebble, 1960: 231-236).

Travisiopso Levinsen'a — *Travisiopsis levinseni* Southern, 1910

Sinonimaro: Tebble, 1960.

La materialon konsistigas 24 ekzempleroj relative bone konservitaj, devenantaj el la regiono inter la Buvet-Insulo kaj la Ŭedel-Maro. Ĉiuj estas kaptitaj per plankton-reto, la plej multaj inter 100 kaj 0 m, du ekzempleroj inter 100 kaj 50 m, du inter 900 kaj 0 m, kaj unu inter 500 kaj 250 m.

Ĉi tie mi rimarkigu ke la figuroj 9 kaj 10 prezentitaj de Hartman (1964, pl. 20) efektive montras *Travisiopsis benhami* Monro = Travisiopso Levinsen'a (*Travisiopsis levinseni* Southern), dum ŝiaj figuroj 11 kaj 12 estas *Sagitella lobifera* Monro = Travisiopso konuskapa (*Travisiopsis coniceps* (Chamberlin)). Same ankaŭ en ŝia listo de sinonimoj la citaĵoj sub *Sagitella lobifera* efektive rilatas al T. konuskapa, ne al T. Levinsen'a.

Tiu ĉi specio estas kolektita en diversaj lokoj apud la okcidenta duono de la Antarktika kontinento, de la Buvet-Insulo ĝis la Ross-Maro, kaj cetere en ĉiuj partoj de la Atlantika Oceano.

INDEX BIBLIOGRAPHIQUE

APSTEIN, C., 1890. Vanadis fasciata, eine neue Alciopide. — Zool. Jahrb., Abt. Syst., 5: 543-545, pl. 38.

——, 1891. Die Alciopiden des Naturhistorischen Museums in Hamburg. — Jahrb. Hamb. wiss. Anst., 8: 123-141, pl. 1.

——, 1900. Die Alciopiden und Tomopteriden der Plankton-Expedition. — Ergebn. d. Plankton-Exp., 2(b): 1-61, pl. 1-7, cartes 1-7.

AUGENER, H., 1928. Die Polychäten von Spitzbergen. — Fauna Arctica, 5: 647-834, pl. 11.

BERGSTRÖM, E., 1916. Die Polynoiden der schwedischen Südpolarexpedition 1901-1903. — Zool. bidr. Uppsala, 4: 269-304, pl. 2-5.

BUSCH, W., 1851. Beobachtungen über Anatomie und Entwicklung einiger wirbellosen Seethiere: 1-143, pl. 1-17. (Berlin).

CLAPARÈDE, E., 1870. Les Annélides Chétopodes du Golfe de Naples, Suppl. — Mém. Soc. Phys. Genève, 20: 365-542, pl. 1-14.

CLAPARÈDE, E. & P. PANCERI, 1867. Nota sopra un Aliciopide parassito della Cydippe densa Forsk. — Mem. Soc. Ital. sci. nat. Milano, 3: 1-9, pl. 1.

COSTA, A., 1864. Illustrazione iconografica degli Anellidi rari o poco conosciuti del Golfo di Napoli. — Ann. Mus. Zool. R. Univ. Napoli, 2: 159-168, pl. 3, 4.

DALES, R. P., 1959. Pelagic polychaetes from the Malacca Straits and South China Sea. — Ann. Mag. Nat. Hist. London, (13) 2: 481-487, fig. 1, 2.

EHLERS, E., 1864. Die Borstenwürmer, 1: i-xx, 1-268, pl. 1-11. (Leipzig).

ESCHSCHOLTZ, F., 1825. Bericht über die zoologische Ausbeute während der Reise von Kronstadt bis St. Peter- und Paul. — Isis 16: 733-747.

FAUVEL, P., 1923. Polychètes errantes. Faune de France, 5: 1-488, fig. 1-188.

FRIEDRICH, H., 1950. Beiträge zur Kenntnis der Polychätenfamilie Typhloscolecidae. — Zool. Jahrb., Abt. Syst., 79: 309-320, fig. 1-4.

GOSSE, PH. H., 1853. A naturalist's rambles on the Devonshire coast: i-xvi, 1-451, pl. 1-28. (London).

GRAVIER, CH., 1911. Expédition antarctique française du "Pourquoi-Pas". — Bull. Mus. nat. Paris, 17: 310-316.

GREEFF, R., 1879. Ueber pelagische Anneliden von der Küste der canarischen Inseln. — Zeitschr. wiss. Zool. Leipzig, 32: 237-283, pl. 13-15.

——, 1882. Über die rosettenförmigen Leuchtorgane der Tomopteriden und zwei neue Arten von Tomopteris. — Zool. Anz., 5: 384-387.

——, 1885. Über die pelagische Fauna an den Küsten der Guinea-Inseln. — Zeitschr. wiss. Zool. Leipzig, 42: 432-458, pl. 12-14.

GRUBE, A.-E., 1848. Einige Bemerkungen über Tomopteris und die Stellung dieser Gattung. — Arch. Nat. Phys. wiss. Med., 1848: 456-468, pl. 16, fig. 9-13.

——, 1855. Beschreibung neuer oder wenig bekannter Anneliden. — Arch. Naturg. Berlin, 21 (1): 81-158, pl. 3-7.

HARTMAN, O., 1964. Polychaeta Errantia of Antarctica. — Antarct. Res. Ser., 3: 1-131, pl. 1-39.

KROHN, A., 1845. Zoologische und anatomische Bermerkungen über die Alciopiden. — Arch. Naturg. Berlin, 11 (1): 171-184, pl. 6.

LANGERHANS, P., 1880. Die Wurmfauna Madeiras II. — Zeitschr. wiss. Zool. Leipzig, 33: 271-316, pl. 14-18.

LEVINSEN, G. M. R., 1885. Spolia atlantica. Om nogle pelagiske Annulata. — Kgl. Danske Vid. Selsk. Skr., (6) 3: 321-344, 1 pl.

MCINTOSH, W. C., 1885. Report on the Annelida Polychaeta collected by H.M.S. Challenger. — Challenger Rep. Zool., 12: 1-554, pl. 1-55, 1a-39a.

MALMGREN, A. J., 1867. Annulata polychæta Spetsbergiæ. — Öfvers. K. Vet. Ak. Förh., 24: 127-235, pl. 2-15.

MONRO, C. C. A., 1930. Polychaete worms. — Discovery Rep., 2: 1-222, fig. 1-91.
——, 1936. Polychaete worms II. — Discovery Rep., 12: 59-198, fig. 1-34.
QUATREFAGES, A. DE, 1865. Histoire naturelle des Annelés marins et d'eau douce: 1-588. (Paris).
REIBISCH, J. G. F., 1895. Die pelagischen Phyllodociden und Typhloscoleciden der Plankton-Expedition. — Ergebn. d. Plankton-Exp., 2(c): 1-63, pl. 1-5, cartes 1-3.
SOUTHERN, R., 1910. A preliminary note on the Alciopinæ, Tomopteridæ, and Typhloscolecidæ from the Atlantic adjacent to Ireland. — Ann. Mag. Nat. Hist. London, (8) 5: 428-429.
STØP-BOWITZ, C., 1948. Polychaeta from the "Michael Sars" North Atlantic Deep-Sea Expedition 1910. — Rep. Sci. Res. "Michael Sars" Exp. 1910, 5: 1-91, fig. 1-51.
——, 1949. Polychètes pélagiques des expéditions norvégiennes antarctiques de la „Norvegia" 1927-1928 — Sci. Res. Norw. Antarct. Exp. 1927-1928, 31: 1-25, fig. 1-9.
——, 1951. Polychètes pélagiques de l'expédition Suédoise antarctique 1901-1903. — Further Zool. Res. Swed. Antarct. Exp. 1901-1903, 4: 1-14.
TEBBLE, N., 1960. The distribution of pelagic polychaetes in the south Atlantic Ocean. — Discovery Rep., 30: 161-300, fig. 1-52.
ULJANIN, B., 1878. Sur le genre Sagitella (N. Wagner). — Arch. zool. exp. gén. Paris, 7: 1-32, pl. 1-4.
WESENBERG-LUND, E., 1939. Pelagic Polychaetes of the families Aphroditidae, Phyllodocidae, Typhloscolecidae and Alciopidae. — Rep. Dan. Oceanogr. Exp. 1908-10 Medit. Adj. Seas, 2 (Biol.): 1-46, fig. 1-30, cartes 1-23.

Liste des localités

St.	Position	Date	Heure	Procédé de récolte	Profondeur en mètres	Espèces recueillies Nombre de spécimens
L'expédition du "Willem Barendsz" 1946/47.						
A001	16°22'N 17°46'W	1946 13 nov.	Le matin	Filet à plancton de 30 cm.	5-0	1 *Alciopina parassitica*
A002	4°27'S 6°10'W	20 nov.	09.00-12.00	Filet à plancton de 46 cm.	75-50	1 *Alciopina parassitica* 3 *Krohnia lepidota* 1 *Tomopteris planktonis* 36 *Tomopteris* indet.
			13.00-17.00	Filet à plancton de 46 cm.	75-50	1 *Rhynchonereella petersii* 1 *Tomopteris mariana*
A003	51°11'S 11°17'E	14 déc.	20.30-21.30	Filet à plancton de 46 cm.	75-50	1 *Tomopteris carpenteri*
A006	56°15'S 6°59'E	17 déc.	15.00-15.30	Chalut à anneau de 150 cm.	100-0	5 *Tomopteris carpenteri*
A008	55°44'S 6°40'E	25 déc.	10.00-12.00	Filet à plancton de 30 cm.	150-0	17 *Rhynchonereella bongraini* 1 *Tomopteris carpenteri* 1 *Tomopteris* indet.
A010	64°29'S 9°39'W	1947 30/31 jan.	20.00-10.00	Filet à plancton de 46 cm.	25-0	12 *Tomopteris* indet.
A011	64°29'S 9°39'W	31 jan.	10.00-11.30	Filet à plancton de 46 cm.	150-100	5 *Pelagobia longicirrata* 123 *Rhynchonereella bongraini* 6 *Tomopteris septentrionalis* 1 *Typhloscolex muelleri*
A012	63°57,5'S 10°25'W	1 fév.	09.30-12.00	Filet à plancton de 46 cm.	150-100	2 *Pelagobia longicirrata* 43 *Rhynchonereella bongraini* 1 *Alciopidae* indet. 5 *Tomopteris carpenteri* 1 *Typhloscolex muelleri*
A013	63,5°S 10°W	1/2 fév.	22.00-09.00	Filet à plancton de 46 cm.	150-100	1 *Pelagobia longicirrata* 1 *Rhynchonereella bongraini*
A014	63,5°S 10°W	2 fév.	10.00-12.00	Filet à plancton de 46 cm.	150-75	8 *Pelagobia longicirrata* 23 *Rhynchonereella bongraini* 1 *Tomopteris* indet.
A015	63,5°S 10°W	2 fév.	14.00-16.00	Filet à plancton de 46 cm.	150-100	8 *Pelagobia longicirrata* 39 *Rhynchonereella bongraini* 3 *Tomopteris septentrionalis*
A017	64°31'S 10°50'W	2/3 fév.	10.00-09.00	Filet d'étamine de 150 cm.	75-0	2 *Vanadis antarctica* 7 *Tomopteris septentrionalis* 68 *Tomopteris carpenteri*
A018	64°31'S 10°50'W	3 fév.	10.00-20.00	Filet d'étamine de 150 cm.	75-0	9 *Vanadis antarctica* 12 *Tomopteris septentrionalis* 40 *Tomopteris carpenteri*
A019	64°31,5'S 10°50'W	3 fév.	12.00-20.30	Filet à plancton de 46 cm.	200-150	11 *Pelagobia longicirrata* 91 *Rhynchonereella bongraini* 2 *Tomopteris septentrionalis*
A020	64°38'S 11°26'W	3/4 fév.	20.00-09.00	Filet d'étamine de 150 cm.	75-50	4 *Vanadis antarctica* 12 *Tomopteris septentrionalis* 36 *Tomopteris carpenteri*
A021	64°38'S 11°26'W	5 fév.	10.00-20.00	Filet à plancton de 46 cm.	150-75	20 *Pelagobia longicirrata* 308 *Rhynchonereella bongraini* 1 *Tomopteris septentrionalis* 1 *Tomopteris planktonis* 7 *Tomopteris* indet.
A022	65°06'S 11°20'W	13 fév.	10.00-20.00	Filet d'étamine de 150 cm.	75-25	6 *Tomopteris septentrionalis* 22 *Tomopteris carpenteri*
A023	65°15'S 10°32'W	16 fév.	10.00-20.00	Filet d'étamine de 150 cm.	75-0	1 *Antinoella antarctica* 31 *Tomopteris carpenteri*
A024	65°15,5'S 10°58'W	18 fév.	11.00-19.00	Filet à plancton de 46 cm.	500-250	10 *Pelagobia longicirrata* 62 *Rhynchonereella bongraini* 15 *Tomopteris septentrionalis*

St.	Position	Date	Heure	Procédé de récolte	Profondeur en mètres	Espèces recueillies Nombre de spécimens
A025	65°15'S 10°58'W	18/19 fév.	22.00-09.00	Filet à plancton de 46 cm.	500-100	9 *Pelagobia longicirrata* 74 *Rhynchonereella bongraini* 28 *Tomopteris septentrionalis*
A027	66,5°S 11°W	25 fév.	14.30-16.30	Filet à plancton de 60 cm.	900-0	1 *Rhynchonereella bongraini* 8 *Tomopteris septentrionalis* 2 *Tomopteris planktonis* 2 *Travisioposis levinseni*
A028	66°11'S 12°14'W	28 fév./ 1 mar.	21.00-09.00	Filet à plancton de 60 cm.	100-50	107 *Tomopteris septentrionalis* 3 *Tomopteris carpenteri* Div. *Tomopteris* indet. 2 *Travisiopsis levinseni*
A029	66°11'S 12°14'W	1/2 mar.	21.30-09.30	Filet à plancton de 60 cm.	100-50	1 *Vanadis antarctica* 78 *Tomopteris septentrionalis* 3 *Tomopteris carpenteri*
A030	66°11'S 12°14'W	2 mar.	12.00-17.00	Filet à plancton de 60 cm.	100-50	1 *Vanadis antarctica* 9 *Rhynchonereella bongraini* 3 *Tomopteris septentrionalis*
A031	66°24'S 13°43'W	3/4 mar.	21.00-09.00	Filet à plancton de 60 cm.	100-0	2 *Vanadis antarctica* 55 *Tomopteris septentrionalis* 1 *Tomopteris carpenteri* 6 *Travisiopsis levinseni*
A032	66°58'S 16°03,5'W	5/6 mar.	21.00-09.00	Filet à plancton de 60 cm.	100-0	5 *Pelagobia longicirrata* 38 *Tomopteris septentrionalis* 9 *Tomopteris planktonis* 2 *Typhloscolex muelleri* 4 *Travisiopsis levinseni*
A033	66°58'S 16°03,5'W	6/7 mar.	21.00-07.00	Filet à plancton de 60 cm.	100-0	1 *Pelagobia longicirrata* 1 *Vanadis longissima* 1 Alciopidae indet. 5 *Tomopteris septentrionalis* 8 *Tomopteris planktonis* 1 *Tomopteris carpenteri* 8 *Tomopteris* indet. 1 *Typhloscolex muelleri* 9 *Travisiopsis levinseni*
L'expédition du "Willem Barendsz" 1947/48.						
A801	56°39'S 12°15'E	1947 8 déc.	14.00-19.00	Filet à plancton de 46 cm.	50-0	2 *Rhynchonereella bongraini*
A802	57°31'S 2°56'W	25/26 déc.	03.00-10.00	Filet d'étamine de 150 cm.	20-0	3 *Tomopteris carpenteri*
A804	57°31'S 2°56'W	27/28 déc.	15.00-09.00	Filet à plancton de 60 cm.	4-0	40 *Tomopteris carpenteri*
A805	61°50'S 16°00'W	1948 9/10 mar.	19.00-08.00	Filet à plancton de 60 cm.	25-0	8 *Tomopteris septentrionolis* 1 *Tomopteris carpenteri*
L'expédition du "Snellius" 1929/30.						
16a	22°28,5'N 37°29,0'E	15 avr. 1929		Filet d'étamine	300 m. de câble	1 *Lopadorhynchus brevis* 3 Alciopidae indet.